

# O BRASIL — ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.  
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 27-28 (309-310)

Março-Abril 1940

Redator responsável:  
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:  
Praça da República, 54.  
Rio-de-Janeiro, Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.  
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15  
respondkuponoj.

## TUTAMERIKA INTERKUNLABORADO

Post la publikigo en "Amerika Esperantisto" de letero de s-ro Ismael Gomes Braga alvokanta la esperantistaron de la Nova Mondo al pripensoj pri kunlaborado dum la nuna kriziga tempo, s-roj Josefo R. Scherer, prezidanto de "Esperanto Association of North America", kaj Ernest G. Dodge, estro de la Aga Komitato de EANA, skribis al tiu sindona samideano kaj al la prezidanto de Brazila Ligo Esperantista prezentante interesan proponon pri tiu temo. Ili proponis, ke oni aperigu ĉiujare du specialajn numerojn de gazeto (tute en Esperanto) sub la jena titolo:

Tutamerika Numero de  
Amerika Esperantisto,  
Argentina Esperantisto,  
O Brasil Esperantista kaj  
La Kanada Bulteno.

Ĝi anstataŭos en ĉiu lando la numeron de la nacia gazeto rilatan al la monato en kiu ĝi aperos.

Kopiojn de tiuj leteroj ricevis la "Argentina Esperanto-Asocio".

EANA ankaŭ proponis, ke la presado de la Tutamerika Numero estu farata en Brazilo, kaj tiu propono estas aprobata de la aliaj asocioj.

La estraro de BLE entuziasme akceptis la proponon de EANA kaj tuj skribis al ties estraro pri detalaĵoj, nome, paĝnombro kaj aperdato de la "Tutamerika Numero", nombro da ekzempleroj, sumo pagota de ĉiu asocio, ke. Al la du aliaj asocioj BLE sendis kopion de sia letero.

Post malmulte da tempo la kvar naciaj asocioj interkonsentis pri ĉiuj ĉefaj punktoj. Jen ili: La "Tutamerika Numero" estos dek-dupaĝa kaj enhavos kelkajn kliŝojn. Ĝia eldono kon-

sistos el 2.000 ekzempleroj. BLE elspozos la sumon de 20 usonaj dolaroj kaj ricevos 700 ekzemplerojn, EANA kaj AEA pagos po 16 dolaroj kaj ĉiu ricevos 500 ekzemplerojn, kaj KEA pagos 3,20 dolarojn kaj ricevos 100 ekzemplerojn.

Ĉiu el la tri unuaj rajtas plenumi tri paĝojn kaj la lasta unu paĝon.

Restos du paĝoj kaj 200 ekzempleroj je dispono de la esperantistaro de la aliaj amerikaj landoj. Ĉiu intere-

sato bonvolu skribi al la prezidanto de Brazila Ligo Esperantista.

La Brazila Registaro ĵus kreis la Departementon de Gazetaro kaj Propagando, kies regularo postulas la registron de "O Brasil Esperantista". Tuj kiam la estraro de BLE ekscios pri tiu registro, ĝi petos permeson por eldoni la "Tutamerikan Numeron".

Tial oni ne povas fiksi la daton de la apero de ĝia unua numero, kiu, ni esperas, ne longe prokrastiĝos.



UNUECO DONAS FORTECON



## Esperanto en la praktiko

### DU GRAVAJ INFORMOJ

1. Aperis la longe atendita Vortaro Lumigo-sciencia, de la Nederlanda Fondado por Lumigo-scienco. Ĝi enhavas 721 terminojn en la nederlanda lingvo, kun la traduko en la lingvoj germana, angla, franca kaj Esperanto. La difinoj de la ĉapitroj estas kvinlingvaj. La samo validas pri la "Maniero de Uzado", "Enhavotabelo" kaj laŭalfabetaj listoj. La esperantaj terminojn prizorgis D-ro Eugen Wüster kaj s-ro W. P. Roelofs. S-ro Roelofs prizorgis ankaŭ la laŭalfabetajn listojn de ĉiuj kvin lingvoj, kiuj estas treege laŭsisteme faritaj.

2. La Argentina Elektroteknika Komitato ĵus eldonis la hispanlingvan parton de la Internacia Elektroteknika Vortaro, kiu enhavas ankaŭ la tradukon en Esperanto.

El "Heroldo de Esperanto"

Jen filmo, kiu estas tute speciale interesa por la Esperantistoj. Oni aŭdas tre klare du Esperantajn vortojn parolitajn de Genevieve Rader, kiu partoprenis privatam kurson kiun mi gvidis por film-geaktorj.

### LA VIRINO DE LA TROPIKO

M. G. M. — filmo kun Robert Taylor, Hedy Lamarr, Joseph Schildkraut ktp. Reĝisoro: Jack Conway.

Jen filmo kiu montras la vivon de indiĝenoj, duonindiĝenoj, kaj blankuloj en la tropika Hindo-Ĉinujo. La fama stelo Roberto Taylor dum vojaĝo per ŝipo al la interno de la hind-ĉinaj prarbaroj kredas ree vidi duonindiĝenan belegulinon kiun li ekamis, sed konstatinte sian eraron petas pardonon pro alparolo al alia virino. La reĝisoro demandis ĉu la "alia virino" F-ino Rader povus diri en iu ajn fremda lingvo ke ne ĝenis ŝin la eraro. Kaj f-ino Rader, kiu ĵus partoprenis mian kurson diris ke ŝi nur scias Esperanton. La reĝisoro kun kiu mi interkonatiĝis dum mia laboro ĉe M. G. M. por "Idiota Amuzo" kaj al kiu mi ofte parolis pri Esperanto, tuj tute aprobis la uzon de Esperantaj vortoj... kaj tial vi aŭdos tute klare "estas bone".

*Opinio:* Pro la uzo de Esperantaj vortoj, kaj pro la beleco de la tropikaj bildoj kaj pro la granda beleco de la ina stelo vi sendube ĝuos la filmon.

HOLLYWOOD

Raportoj

de Joseph R. Scherer

## La familio de D-ro Zamenhof

*Cirkuladas la plej diversaj onidiroj kaj informoj pri la sorto de la familiaj de nia karega Majstro. Unuj diras ke d-ro Adamo kaj kelkaj liaj parencoj estis arestitaj, aliaj ke F-ino Sofio estas en Usono kaj F-ino Lidia estas en Suda Francujo aŭ en Palestino, aliaj ke la tuta familio jam estas en Palestino. Eĉ iu gazeto informis, ke d-ro Adamo mortis en malliberejo dum la monato Januaro. Tamen unu bedaŭrinda fakto ŝajnas esti vera — brulis la domo, kie loĝis la filo de Zamenhof kaj perdiĝis ĉiuj liaj dokumentoj kaj memoraĵoj.*

*Oni aŭdis, ke nia karega amiko D-ro Odo Bujwid restas en sia funkcio kiel gvidanto de la Serologia Instituto en Krakovo. Ke tio estu vera, estas nia forta deziro! Per privata letero ni eksciis ke nia bona amiko, d-ro Thadeo Grabowski, eksambasadoro en Brazilo, nun loĝas en Varsovio, sed, bedaŭrinde, perdis sian tutan havaĵon.*

## NOVA BRAZILA RADISTACIO DISRADIAS EN ESPERANTO

La potenca Radistacio Piratininga PRH3 (483,9m) aŭ (620kc), São Paulo, ĉefurbo de Stato S. Paulo, Brazilo, ĵus inaŭgurita, proprvole cedis al "S. Paulo Esperanta Klubo" ĉiutagan horeron por la propagando de la helplingvo Esperanto. Interkonsente kun la Klubo oni fiksas la jenan horeron: 18.00-18.15 (loka horo) aŭ 22.00-22.15 (Centra-Eŭropa-tempo).

La programo konsistas el kursoj, paroladetoj, kantoj, deklamadoj, ke. Ĝin direktas S-roj d-ro Geraldo de Azevedo, prez. de SPEK; Mario Rodrigues Monteiro, vicprez.; Osvaldo Leite de Moraes, ĝen. sek.; Abraão Sarraf, kas. kaj Emilio Baldacci, reprezentanto de SPEK en Santo André.

Bonvolu sendi, eĉ se vi ne aŭdis la radistacion, dankajn leterojn al la jenaj direktoroj de Radio Piratininga: Prof. d-ro Romen de Campos Vergal, prez.; Pedro de Camargo, kontrolisto; Floriano Peixoto Costa, administranto; Odilon Negrão, sek.; d-ro Romeno do Amaral Camargo, kasisto, kaj d-ro Benedito Galvão, jura konsilanto.

Al ĉiuj danksendintoj la Klubo sendos belegan poŝtkarton.

## DISRADIADO EN BRAZILO

(Centra-Eŭropa-tempo)

*Ĉiutage:* 22.00 — 22.15 Radio Piratininga. São Paulo. PRH3 (620kc). Kursoj, paroladetoj, kantoj, deklamadoj, ke.

*Marde:* 22.40 — 23.00 Radio Vera Cruz, Rio-de-Janeiro (katolika). PRE2 (1430kc). Kurso, muziko kun kanto en Esperanto.

*Ĵaŭde:* 22.50 — 22.55 Radio Transmissora. Rio-de-Janeiro. PRE3 (1180kc). Kurso.

*Sabate:* 20.00 — 20.15 Radio Club de Pernambuco. PRAS (730kc). Kurso.

## HEROLDO DE ESPERANTO

FONDITA EN 1920

La prezidanto de BLE ĵus ricevis de s-ro Teo Jung, redaktoro de "Heroldo de Esperanto", leteron datumitan de l' 26a de Februaro, el kiu ni elĉerpis la jenan pecon: "Eŭropo denove estas militanta; sed feliĉe la malgrandaj Nederlando kaj Belgujo restas pacaj insuloj. Sekve ankaŭ mi povas daŭrigi mian laboradon, kvankam en malpli granda amplekso. Post 1 1/2 monatoj estos pasintaj dudek jaroj, de kiam mi fondis (je la mortotago de la majstro, la 14an de aprilo, 1920) la gazeton "Esperanto Triumfonta", kiu poste fariĝis la nuna "Heroldo de Esperanto". Tiuj jaroj ne estis facilaj, kaj nun ekestas la plej granda malhelpaĵo: milito. Tamen mi estas decidema persistadi, kaj tiun decidemon plifortigas la samideanoj.

Speciale mi ĝojis, kiam s-ro Goldsmith sciigis min ke Brazila Ligo, kiel unna, fariĝis PATRONO DE HEROLDO por la nuna jaro. Pro tio mi esprimas al vi, kiel Prezidanto de la Ligo, mian plej koran dankon!"

.....  
Karaĵ ligoj, estas devo de ĉiu brazila esperantisto, precipe dum la nuna milita tempo, helpi al "Heroldo de Esperanto", oficiala organo kaj informilo de INTERNACIA ESPERANTO-LIGO. S-ro Teo Jung, pro sia konstanta, inteligenta kaj sindonema laboro dum 20 jaroj, meritas la simpatian de la tuta esperantistaro. Fariĝu MAH kaj vi helpos samtempe nian internacian Ligon kaj tiun gazeton. Jen la jara kotizo por MAH: izolita ano de BEL — 70\$ kaj ano de filiita grupo — 65\$000.

ESPERANTISTA DEVO: Varbu unu novan esperantiston 1940!



PROPAGANDA DO BRASIL NO ESTRANGEIRO

Quantos se interessam pelo desenvolvimento econômico do Brasil, mas não são esperantistas nem esperantófilos, e não têm, por isso, *O Brasil Esperantista*, hão de gostar de inteirar-se por estas linhas, dos dois fatos que constituem o seu objetivo.

Um: O Dr. Demócrito Rocha, publicou em *O Povo*, jornal que dirige em Fortaleza, um minucioso e curioso artigo relativo à *oiticica* e à sua indústria no Nordeste, incluindo no trabalho em apreço úteis informes de ordem científica e de ordem prática.

Pois bem, esse artigo, traduzido em Esperanto, e publicado aqui no citado órgão esperantista foi vertido para a língua *magyar* pelo Dr. Toth Vice, oficial da Milícia Húngara, e editado há pouco no *Magyar Kereskedelm és Pénzügy*, diário que há vinte e nove anos circula em Budapeste, — o que redundará para o nosso país numa propaganda cujas vantagens não necessito de salientar.

Outro: O Dr. Alberto Couto Fernandes, cuja atividade não cessa quando se trata de vulgarizar a admirável língua-auxiliar e quando se cogita de qualquer interesse do nosso Maranhão, deu a lume, em o número mais recente do aludido órgão da Liga Esperantista Brasileira, um erudito e útil trabalho, também em Esperanto, e relativo ao *babassá*, a outra planta oleaginosa a que está reservado um importantíssimo papel na economia nacional.

Induz-me o valor do seu trabalho a fazer daqui uma sugestão ao Interventor no Maranhão, Dr. Paulo Ramos, que tão empenhado se tem mostrado na campanha a prol da intensificação do comércio exterior e da industrialização da *orbíginea speciosa*, que, em mais de um bilhão de exemplares, frutifica no solo maranhense.

E a sugestão é esta: mandar o Estado editar largamente, em folheto, o trabalho do Dr. Couto Fernandes, para ser lido pelas incontáveis pessoas que, em todo o mundo civilizado conhecem a língua-segunda ou "auxiliar".

"Língua-segunda" costumamos chamar ao Esperanto, porque não a consideramos língua estrangeira, pois que, por não ser de nenhum povo, é de todos, e, portanto, também nossa. — Domingos Barbosa.

(Do "Jornal do Brasil" de 10 de Março de 1940).

PRI KORESPONDADO EN ESPERANTO

Responde al peto farita de "Esperanto-Asocio de Estonio" al la Ĉefgvidanto de la Estonaj Armeoj oni informis, "ke malgraŭ la granda valoro de la klariglaboro, farita de la anoj de EAE por la Estona Respubliko eksterlande en la Esperanta lingvo, kaj la domago, kiun kaŭzas la interrompo de tiu klariglaboro, estiginta devige de la cirkonstancoj, pro diversaj konsideroj ne estas eble plenumi la peton de EAE kaj noti la Esperantan lingvon inter la lingvoj permesitaj en korespondado kun eksterlando".

Tomen la esperantistoj en Estonlando ĝojas ricevadi esperantajn leterojn, kvankam ili ne povas ilin respondi en Esperanto.

(El "Informoj de Esperanto-Asocio de Esperanto").

Societo de Geografio de Rio - de - Janeiro

Honorigo al GENERALO MOREIRA GUIMARÃES



Prezidanteca tablo — Maldekstre dekstren: D-ro Cristovam Leite de Castro, ĝenerala sekretario de la Brazila Konsilantaro de Geografio; s-ro reprezentanto de la Germana Ambasadoro d-ro Max Fleiuss, ĝenerala sekretario de la Brazila Historia kaj Geografia Instituto; s-ro Admiralo Raul Tavares, nuna prezidanto de la Societo de Geografio; s-ro Kazuo Kuwajima, Japana Ambasadoro; Generalo Candido Rondon, honora prezidanto de la Geografia Societo, kaj Prof. La Fayette Córtes, direktoro de la fama Instituto La Fayette.

La 7an de Marto efektiviĝis ĉe la sidejo de la *Societo de Geografio*, sole-na kunsido por honorigi la memoron de ĝia tre amata prezidanto Generalo J. M. Moreira Guimarães. Prezidis la kunsidon Admiralo Raul Tavares, unua vicprezidanto kaj lia anstataŭinto. Paroladis unue la oficiala oratoro D-ro Carlos Xavier Pais Barreto. Poste parolis kelkaj societanoj kaj reprezentantoj de diversaj korporacioj. En la

nomo de *Brazila Ligo Esperantista* parolis S-ro A. Couto Fernandes, ĝia prezidanto, kiu rememorigis la grandajn servojn faritajn al la propagando de Esperanto en Brazilo de l' karmemora ĝeneralo, kiu estis prezidanto de Brazila Klubo Esperanto kaj poste ĝia Honora Prezidanto. Dum la kunsido oni legis diversajn kondolencajn leterojn, el kiuj ni citas tiun de *S. Paulo Esperanta Klubo*.

ZAMENHOF

A ANTONIO GARRIDO

"Genezis, cap. XI. — Por isso se chamou o seu nome Babel, porquanto ali confundiu o Senhor a língua de toda a terra".

Deuses eternos como a eterna lenda,  
Deuses — em poderio milenar,  
Lançam os homens na Babel tremenda,  
Impondo a cada tribo um linguajar...

E o Iluminado, sem alguém que o entenda,  
Trabalha e sofre e anseia, em pobre lar:  
Operário sublime — a sua tenda  
E' um Tabor a fulgir e relumbrar.

Transfigurado, cria o idioma novo.  
E, realizando idéia sobrehumana...  
Converte a humanidade num só povo

Homem, maior que os deuses, no Ideal,  
Duas mil línguas, numa só, irmana,  
— Dando aos homens o Verbo Universal!

Fevereiro — 1940.

LÚCIO VÁRZEA

NEKROLOGO

D-ro Bulhões Carvalho

La 9an de Marto lasta mortis la eminenta brazilano d-ro J. L. S. de Bulhões Carvalho, kreinto de la brazila statistiko kaj ĝenerala direktoro de la brazila homregistrado en 1920.

Li naskiĝis en Rio-de-Janeiro kaj, en la jaro 1887, doktorigis en medicino. Li estis membro de la Brazila Medicina Akademio kaj dum longa tempo estis redaktoro-administranto de la revuo "Brasil Médico".

Li okupis gravajn oficialajn funkciojn kaj fine fariĝis Direktoro de la Ĝenerala Direkcio de Statistiko, oficon, kiun li efike plenumis ĝis sia emeritiĝo.

Li estis tre simpatia al Esperanto. En la jaro 1908, laŭ lia propono al la Ministro por Publikaj Laboroj, la Ĝenerala Statistiko-Direkcio eldonis la *Bultenon Memorigan* pri la Nacia Ekspozicio, kun titoloj en la lingvoj portugala, franca kaj Esperanta, krom aparta antaŭparolo en la helpa lingvo.

La prezidanto de *Brazila Ligo Esperantista* sendis kondolencan telegramon al lia Familio, al kiu ni ankaŭ kondolencas.



## BRAZILU — JAPANUJO

Antaŭ iom pli ol kvardek jaroj Japanujo estis ankoraŭ, por ĉiuj okcidentaj popoloj, legenda lando, limigita ĉe la pentrindaj urboj, plenaj de kioskoj kaj altanoj, kun paperaj muroj, kie fantaziaj virinoj, faritaj de mistero kaj nepenetreblaj ĉarmoj, krucigis kvazaŭ ombroj. La vento, iam kaj iam, sonigis la tegmentojn de la porcelanaj turoj, kiuj grandnombre ekzistis en la urbaj kvartaloj. La vojaĝaj libroj ion alian ne konis kaj la plezurigaj akvarelistoj prezentis al ni nur japanajn pejzaĝojn sur rizpapero kun anemiaj tonoj kaj koloraspektoj. Sed la energioj de la japana popolo, tuŝitaj de novaj idealoj, komprenante la mirindaĵojn, kiun realigas la laboro, en multaj jaroj, ŝanĝis la malnovajn konceptojn kaj bildojn, tiamaniere ke Japanujo povis sin prezenti antaŭ la okcidentaj popoloj, progresemaj kaj civilizitaj, kun justa fiereco pri sia valoro. Per spiritakreco kaj inteligenteco, rapide infektitaj de la entuziasmoj, kiujn la diversaj aroj da klarvidaj ŝtatestistoj kaj patriotoj instigis, la japanoj sin altrudis kiel kapablaj je ĉiuj realigoj asimilante la kulturon rikoltitan ĉe la Okcidento, tiamaniere ke iliaj industrioj havis neatenditan progreson kaj ilia kolektiva riĉeco atingis de tiam la ekstremojn de la komforto. De tio ĝis ĝi fariĝis potenco kapabla agi en la internacia ekvilibro dependis de malgranda peno. Pere de mirakloj, kiujn nur la patriotismo klarigas, Japanujo plenumis miregindan programon, plibonigante la instruadon, kreante superajn lernejoj, fondante ĉiuspecajn institutojn, sciencajn, artajn, plifortigante la produktantajn fontojn, trudante la normojn de kulturo refreŝigita de la modernaj idealoj. Rapide, nur en duona centjaro, la beletristiko, la sciencoj, la industrioj kaj la komerco mirinde vigligis, donante al la japana popolo la impulsojn, kiuj konsistigis la sekreton de la grandaj kaj konstantaj realigoj. Izolita, en insuloj, en nesufiĉa teritorio, Japanujo devis plivolumeniĝi tra la oceanoj. El tio rezultis la potenco komercŝiparo, kiun forta militŝiparo devas protekti.

La japana popolo trovis la marajn vojojn, kiuj simpligis la asimiladon de ĉio, kion la okcidentaj popoloj realigadis, ĉe la ĉiutagaj laborejoj por la konkero de la komfortoj. Hodiaŭ Japanujo havas grandegan influon ĉe la internacia ordo. Tiu influo devenas precipe de ĝia produktanta kapablo, kiu partoprenas la vivon de ĉiuj landoj, per la senĉesa interŝanĝo de valoroj.

Neniu nescias la ekonomiajn ligilojn,

kiuj nuntempe nin ligas al Japanujo, kiam ĝiaj merkatoj postulas grandan parton de niaj kotonaj rikoltoj kaj la niaj postulas la produktojn de ĝia industrio, simpla kaj efika armilo kontraŭ la prezaltiĝoj. Kreinte bonegan militŝiparon, kiu seninterrompe marveturas, Japanujo forigis la barojn de la distancoj. Ĉiuj tiuj faktoj klarigas kaj pravigas la intereson, per kiu Brazilo akompanas la japanan progreson kaj serĉas respondi al la simpatio de la japanoj, kies kolonio, kunligita kun ni, ĉiam kreskadas.

(Artikolo verkita de D-ro Lourival Fontes, ĝenerala direktoro de la "Departemento de Gazetaro kaj Propagando", kaj aperinta sur la unua paĝo de la ilustrita revuo "Brasil-Japão", oficiala organo de la INSTITUTO BRAZILA DE JAPANA KULTURO, ĉe la Placo Getulio Vargas, 2 — 1.º andar. Rio-de-Janeiro).

## INTIMAJ VERSOJ

AUGUSTO DOS ANJOS

(Libera traduko de I. Matos Quinaud)

En mia kor' ekzistas diaj domoj,  
praatempa preĝejo forlasata,  
kie kantas Amoro — la ŝatata —  
pri la senkulpa kredo de la homoj.

Sur la kolonoj kaj sur la fenestroj  
brilas radioj de lampo brulanta,  
lumo, eterna lumo blindiganta,  
— arĝento kaj floro kaj diestroj.

Simile al monaĥoj mezepokaj,  
mi alvenis en katedraloj rokaj,  
kie suno batalis kontraŭ trevoj.

Pelata de Doloro kiel sklavo,  
mi eniris malsaĝe kaj per glavo  
detruis bildon de la propraj revoj!

9-4-1940.

## LA TOMBO KAJ LA ROZO

(El V. Hugo)

La Tombo diris al la Rozo:  
— El rosaj larmoj, sen ripozo,  
Vi kion faras, ama flor' ?  
La Roz' al Tombo por rediro:  
— Vi kion faras el Pakiro  
Falanta vin je ĉiu hor' ?

La Roz': — En l' ombro, Tomb' mal-  
[proksima,

Mi faras el la roso larma  
Odoron ambran, de miel'.

La Tombo: — ho flor' pendanta,  
El ĉiu la anim' venanta  
Angelon faras de ĉiel'!

Trad. A. GRABOWSKI

(El "Lingvo Internacia". Majo 1904).

## LA KALKULANTA VIRO

MALBA TAHAN

Beremis respondis:

— Temas malpli pri problemo ol simpla aritmetika kuriozaĵo. Jen estas ĝia eldiraĵo:

"Rajao lasis al siaj filinoj certan nombron da perloj kaj ordonis, ke la dividado fariĝu laŭ la jena maniero: la plej maljuna filino prenis unu perlon kaj unu seponon de la restinta kvanto; venus poste la dua, kiu prenis al si 2 perlojn kaj unu seponon de la restaĵo; poste la tria junulino ricevis 3 perlojn kaj unu seponon de la restaĵo. Kaj tiel plu.

La plej junaj filinoj plendis al la juĝisto kontraŭ tio, deklarante ke per tiu komplikita sistemo de partigo ili nepre malprofitigis.

La juĝisto — tekstas la tradicio — kiu estas lerta pri la solvo de problemoj, tuj respondis al la plendintinoj, ke ili eraras kaj ke la dividado proponita de la maljuna rajao estas justa kaj ekzakta.

Kaj li estis prava. Post la partigo ĉiu el la heredintinoj ricevis la saman kvanton da perloj."

Oni demandas: Kiu estis la nombro de la perloj? Kiom nombraj estis la filinoj de la Rajao?

La solvo estas tre simpla.

La perloj estis 36 por esti dividataj inter 6 personoj.

La unua prenis unu perlon kaj pli unu seponon de 35, tio estas, 5; do ŝi prenis 6 perlojn kaj lasis 30.

La dua, el la 30 perloj, kiujn ŝi trovis, prenis 2 kaj unu seponon de 28, tio estas, 4; do ŝi prenis 6 kaj lasis 24.

La tria, el la restintaj 24 prenis 3 kaj unu seponon de 21, aŭ 3. Ŝi prenis do 6 perlojn kaj lasis 18, kiel reston.

La kvara, kiu trovis 18, prenis 4 kaj unu seponon de 14. Ŝi ankaŭ ricevis 6 perlojn.

La kvina trovis 12 perlojn, prenis 5 kaj seponon de 7, tio estas, 1; do ŝi prenis 6 perlojn.

Fine la plej juna filino ricevis la 6 restintajn perlojn.

Kaj Beremis findiris:

— Kiel vi vidas, la problemo, kvankam lertelpensita, tute ne estas malfacila. Oni ĝin solvas sen artifiko aŭ rezonaj subtilaĵoj.

Esperantigis A. COUTO FERNANDES

(El la interesa libro de MALBA TAHAN — O Homem que calculava — (La kalkulanta viro).



# 27a Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj

MAJO DE 1940



## LOVEĈ LA URBO DE LA KONGRESO

Loveĉ estas malgranda, belaspekta kaj pura urbeto, situita sur la du bordoj de la rivero "Osam". Unika sur la tuta balkanduoninsulo kovrita ponto kunligas la ambaŭ partojn de la urbo. Ambaŭflanke de la ponto estas amaso da butikoj, en kiuj oni vendas diversajojn. Pitoreskaj rokoj, altkreskintaj siringarbetoj ĉirkaŭas la urbon. La rivero trairas serpente la rok-ojn.

Loveĉ estas fame konata kiel antikva, roma fortikaĵo "Melta". Pli-malfrue, dum la turka jugo, ĝi estis ĉefur-

bo de la bulgaraj revoluciuloj kaj ribelantoj. Nun ĝi estas regiona urbo kaj nombras ĉirkaŭ 10.000 loĝantojn. Ĝi fieras pro sia gimnazio.

Ĉiam belaspekta estas la urbo, sed belega estas dum majo, kiam la siringo-joj plene disflorigas kaj odorigas la aeron. En tia tempo, kiam Loveĉ estas plej ĉarma, okazos tie la kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj.

La vizitado de la sama estas faciligita de modernaj kunligoj: Fervojo, kiu kunligas la urbon kun la "Danubo" tra Sviŝtov kaj kun la ĉefurbo "Sofio", bonaranĝitaj ŝoseoj, sur kiuj konstante cirkulas aŭtobusoj, aŭtomobiloj kaj diversaj veturiloj.

## AL LA ESPERANTISTOJ TUTMONDAJ

Laŭ la nunaj specialaj limigoj en la uzo de fremdaj lingvoj en korespondado, oni malpermesis esperanton kiel korespondan lingvon en nia lando. Tamen al nia klubo oni koncesis specialan permeson sendi en 57 landojn 4000 leterojn. Nun la nomitaj leteroj estas sur la vojaĝo. Ni dankas Vin pro la servoj jam faritaj kaj petas, ĉar viaj leteroj atingas nin, ke ĉiuj adresatoj sciigu al ni pri alveno de la leteroj. Bonvolu publikigi ĉi tiujn sciigojn en iu gazeto de via lando. Ni antaŭdankas Vin!

Esperantoseura Helpo.  
Kuopio, Työväentalo, Finnlando.

(El "Savon Työmies")

Nur du lingvojn lernu tuj,  
Kaj ne pensu pri la tria:  
Estu unu de l' Patruj',  
De l' homar' estu l' alia!

I. G. B.

LA ESTRARO DE BRAZILA LIGO ESPERANTISTA PETAS, KE ĈIU GRUPO KAJ IZOLITA ANO ELEKTU SIAN REPRESENTANTON ĈE ĜIAJ GENERALAJ KUNSIDOJ.

## S I P E T O

Malgranda ŝipeto  
Kun blanka veleto  
Naĝadas trankvile sur maro...  
Sed venas ventego,  
Fariĝis ondegó —  
Pereas ŝipet' sub akvaro!  
Kaj homo mizera  
Kun kredo sincera  
Vivadas trankvile en mondo;  
Sed knedo forblovis  
Ondego sin movis,  
Kaj homo pereas sub ondo.

V. DEVJATNIN

(El "Fundamenta Krestomatió").

## SALUTO AL LA JAPANAJ ESPERANTISTOJ

Pere de S-ro João Batista Dubieux, loĝanta en Santos, gravega urbo en ŝtato S. Paulo, kiu forveturis al Japanujo sur la belega vaporŝipo "Brasil-Marú", Brazila Ligo Esperantista sendis la jenan salutleteron, kiu estos transdonata al la "Japana Esperanto-Instituto":

"Permesu, estimataj japanaj samideanoj, ke ni, viaj brazilaj amikoj, salutu vin, tiel malprosimajn en la spaco, sed tiel proksimajn en kunsento.

La ĉielo bonvolu beni ĉi tiun sanktan ligitecon de Esperantistaj koroj kaj ke la komuna afero nin tenanta en sama rondo daŭru ĉiam pli viva kaj fine venku la barojn de la universala interkonsento.

En ĉi tiu maldolĉa horo, kiun ni vivas en profunda malĝojeco, ni firme paŝu antaŭen kun nia paco-standardo, — kiu estas tiu iam levita de homoj tre kara al ni ĉiuj.

Kunportas ĉi tiun saluton nia samideano s-ro João Batista Dubieux".

Subskribis ĉi tiun salutleron geanoj de Brazila Ligo Esperantista loĝantaj en Rio-de-Janeiro kaj São Paulo.

## O ESPERANTO NA POLICIA

Em fins de 1939 realizaram-se em Haia, capital da Holanda, exames oficiais para os policias que frequentaram os cursos de Esperanto mantidos oficialmente pelas sociedades locais.

Dos 132 alunos matriculados nesses cursos apresentaram-se a exame 72, dos quais foram aprovados 64. A estes o burgo-mestre, Dr. Mr. de Mouchy, fez solenemente entrega dos respectivos diplomas dirigindo-lhes nessa ocasião algumas palavras de encorajamento.

## A BARQUINHA DA VIDA

A fraca barquinha,  
com branca velinha,  
flutua tranquila no mar...

Vem a ventania,  
faz a onda bravia  
e ela entra logo a sossobrar.

Creatura humana,  
com fé puritana,  
tranquila, vai sempre a vagar.

A crença fenece,  
a onda aparece  
e o mar bramindo a vai tragar.

Aristoteles J. de Faria Alvim.



# BRAZILA KRONIKO

CEARÁ. *Fortaleza*. — Ĉe la "Circle of English Conversation" (Angla-lingva Interparolado-Rondo) okazis kunveno, dum kiu s-ro prof. Euclides Cesar donis sian praktikan lecionon de angla lingvo. Poste komenciĝis la literatura horo. Paroladis diversaj oratoroj, el kiuj ni citas s-ron Fernando Cardoso, kiu salutis d-ron Democrito Rocha, tiam vizitantan la Rondon, kaj s-ron Luiz Furtado, kiu faris paroladon pri Esperanto. Reliefigante ke Esperanto estis inspirita de la universala frateco, li montras la servojn faritajn de d-ro Democrito Rocha por intensigi la propagandon de tiu helplingvo en ŝtato Ceará. Tiu ĉi parolante en Esperanto dankis la ĝentilajn vortojn al li adresitajn, diris siajn impresojn pri la Rondo kaj reliefigis la lastajn progresojn tra la tuta mondo. Servis kiel interpretisto por la tradukado angla-lingven de liaj vortoj s-ro Alberto Bausade, kaj tio bone efikis ĉe la aŭdantaro. Poste oni deklamis soneton titolitan "Zamenhof", verkitan de Lúcio Varzea kaj dediĉitan al Antonio Garrido, pseŭdonimoj, respektive, de d-ro Julio Maciel kaj d-ro Democrito Rocha. Al la anoj de la Rondo tiu ĉi disdonis librojn pri Esperanto.

La 14an de Februaro rekomenciĝis la semajnaj lecionoj de Esperanto ĉe la Instituto Lourenço Filho, kie la sekvintan tagon d-ro D. Rocha malfermis intensan kurson speciale por intelektuloj, kiu funkcias lunde, merkrede kaj vendrede. Krom aliaj personoj, enskribiĝis d-roj Daniel Lopes, supera juĝisto, Filgueiras Lima kaj Paulo Garasate, direktoroj de la Instituto, kaj João de Deus Cavalcante.

Aliĝis al BEL/IEL la jenaj aninoj de la "Katolika Esperantistina Klubo": F-inoj Neusa Vieira kaj Guimaraes de Aquino.

"O Povo" aperigis longan artikolon pri Generalo Moreira Guimarães, alian titolitan "Tempo perdita ĉe la lernado de naturaj lingvoj" kaj diversajn notojn pri Esperanto kaj transskribis la artikolon de D-ro Domingues Barbosa rilatan al la verkoj pri Oĵitico kaj Babasuo aperintan en "Jornal do Brasil".

RIO GRANDE DO NORTE. *Natal*. — S-ro Moacir S. Cunha, kiu antaŭ nelonge komencis kurson per korespondado, jam montriĝas bona propagandisto. Li verkis artikolon titolitan "La demando pri internacia lingvo", kiu aperis sur la gazeto "O Estudante", oficiala organo de "Centro Estudantal Potiguar", kies unu el ĝiaj direktoroj,

## Esperanto en Pernambuco



F-ino Maria do Socorro Monteiro, prez. de Grupo Esperantista "Ismael Gomes Braga".

s-ro José Alcantara, iam publikigis artikolon sub la titolo "Zamenhof kaj Esperanto". Dum vizito al Mossoró li interparolis kun samideano s-ro Júlio Cesar Gurgel kaj en Areia Branca kun d-ro Gentil Fernandes, kiu tie direktas vesperan kurson, kaj s-roj Ascendino Almeida Junior kaj Clidenor Costa, kiuj entuziasmiĝis pri la helplingvo. Ni esperas, ke s-ro Moacir Cunha baldaŭ fariĝos delegito kaj fondos grupon.

PERNAMBUCO. *Recife*. — Jam aperis la 6a, 7a kaj 8a numeroj de "Pernambuco Esperantista", oficiala monata organo de "Pernambuka Esperanto-Asocio", kies redaktoro estas la fervora esperantisto s-ro Odilon Vidal de Araujo. Ili publikigis diversajn novajn kaj malnovajn literaturaĵojn kaj interesajn artikolojn de Ismael Braga, el kiuj ni citas tiun titolitan "Esperanto kaj Religiaj Movadoj". Ĉe la 7a numero komenciĝis, kiel felietono, la publikigo de majstre verkita rakonto de s-ro Inácio Matos Quinaud, klera ĵurnalisto loĝanta en Pirapora, ŝtato Minas Gerais, kiu ĵus aliĝis al BLE/IEL kiel MAH. La regula apero de "Pernambuco Esperantista" estas evidenta pruvo ke la propagando de Esperanto en tiu norda ŝtato bonege marŝas kaj esperigas mirindajn sukcesajn.

Veturante al Rio-de-Janeiro vizitis la ĉefurbon de Pernambuco akompanata de la ĝentilaj filinoj de s-ro Odilon Araujo f-ino Angelita de Saboya Campos, anino de la "Katolika Esperantistina Klubo".

*Garanhuns*. — La gazeto "A Voz do

Instituto" aperigis notojn pri la progresoj de Esperanto. Aliĝis al niaj Liĝoj s-ro Otaviano Acioli, instruisto ĉe la "Ginásio Municipal Diocesano". Ĉe la sidejo de la grupo okazas ĉiuvendrede kurso de Esperanto.

*Caruará*. — Fondiĝis "Grupo Esperantista Couto Fernandes", kies unua estraro konsistas el la jenaj sinjoroj: Evandro F. Vasconcelos — prezidanto, José Rogoberto de Barros — sekretario, d-ro Luiz Pessoa da Silva — kassisto. Al la prezidanto de l' grupo sendis s-ro Couto Fernandes, en la nomo de BLE, gratulan telegramon kaj, en sia propra nomo, koran dankon pro la elekto de sia nomo kiel patrono de la grupo.

BAÍA. *Salvador*. — Sub la gvidado de d-ro Jaddo Couto Maciel daŭras la propagando. Revenis d-ro Castro Meneses. La 8an de Aprilo malfermiĝis kurso de Esperanto ĉe "Sociedade Filatélica Baiana".

*Alagoinhas*. — Sekve de la vigla propagando farita dum la lasta monatoj pere de kursoj, festoj kaj notoj en gazetoj fondiĝis "Esperanto-Klubo de Alagoinhas". Tio okazis la 24an de Marto post la disdono de la Atestoj pri lernado al la gelernintoj de l' kursoj faritaj de s-ro Carlos de Souza Cunha, kiuj sukcesis aprobon ĉe la ekzameno farita la 29an de Decembro en la "Kolegio 10 de Junio". Iliajn nomojn ni publikigis en nia lasta numero. Jen estas la estraro de la ĵus fondita klubo: Honora prez. — s-ro Alberto Couto Fernandes, honora membro — s-ro Ismael Gomes Braga, prez. — s-ro prof. Antonio Lins, vicprez. — s-ro Salomão Barros, unua sek. — s-ro Lucio B. Cardoso, dua sek. — s-ro José Marcelino Silva kaj kas. — prof-ino Eurydice Barros. Per telegramoj oni sciigis s-rojn Couto Fernandes kaj Ismael Braga pri la fondo de l' klubo. Al s-ro Carlos Cunha kaj al la estraro de EKA s-ro Couto Fernandes sendis gratulan kaj dankan telegramon. La klubo decidis aliĝi al BLE/IEL.

*Chique-Chique*. — Laŭ peto de s-ro Geraldo Ribeiro de Araujo, oficisto ĉe la loka urbestrejo, BLE sendis informojn kaj esperantaĵojn.

S. PAULO. *S. Paulo*. — La lasttempa intensigo de la propagando de Esperanto en tiu ĉefurbo ĵus donis bonegan frukton. La nova potenca radistacio "Piratininga", inaŭgurita en la komenco de Aprilo, cedis al "S. Paulo Esperanta Klubo" horegon por la propagando de Esperanto. Pri tiu granda sukceso ni detale parolas aliloke. No



vaj geesperantistoj aliĝis al SPEK kaj multaj personoj enskribiĝis en la kurson funkciantan en ĝia sidejo.

**Santo André.** — La 13an de Marto, sub la aŭspicioj de SPEK, ĉe Clube Santo André, okazis solena inaŭguro de nova kurso, kiun direktas d-ro Geraldo de Azevedo, ĝia prezidanto. Ĝin ĉeestis reprezentanto de la urbestro, prof. Francisco Degni, de la Universitato de S. Paulo, kaj la fremda esperantisto s-ro Josef Cahn. Paroladis s-roj d-ro Geraldo de Azevedo kaj Mario Rodrigues Monteiro. Aŭdiĝis diskoj kun kantoj en Esperanto.

La gazetoj "O Imparcial" aperigis artikolon pri tiu inaŭguro kaj aliajn titolitajn "Esperanto, internacia helplingvo" kaj "Esperanto kaj ĝiaj praktikaj realigoj", kaj "O São Bernardo" la jenajn artikolojn de s-ro Mario Monteiro: "Esperanto kaj la Militoj" kaj "Esperanto kaj la internaciaj amikecoj".

**Santos.** — S-ro Lauro Jorge de Oliveira, ĉefa delegito, paroladis pri Esperanto ĉe la "Liceu Coelho Neto", oficialigita komerca lernejo, antaŭ siaj ĝelernantoj de la angla lingvo. Ĉar ili montris deziron lerni la helplingvon, malfermiĝis kurso direktata de s-ro Luiz Gomes Cruz. S-ro Lauro de Oliveira daŭrigas sian semajnan kurson ĉe la sidejo de "Centro Esperantista de Santos". Ĝia ano s-ro Lauro J. Costa aliĝis al BLE/IEL.

**Jaboticabal.** — La gazeto "O Democrata" sciigis sian legantaron pri la inaŭguro de la Esperanto-kvarono ĉe la nova radistacio "Piratininga", en São Paulo, kaj la malfermo de kurso de tiu internacia lingvo en la sidejo de la "Sociedade Cultural Jaboticabalense".

**RIO GRANDE DO SUL. Porto Alegre.** — "Correio do Povo" ilustris artikolon de d-ro Benjamin Camozato pri Filatelio per kliŝo de la stampo en Esperanto uzita dum la 12a Internacia Specimenfoiro de Rio-de-Janeiro. Li atentigas la legantaron de la gazeto pri tiu stampo, kiu estas nova pruvo, ke la brazila Registaro daŭrigas doni sian apogon al Esperanto.

**MINAS GERAIS. Belo Horizonte.** — Interesa intervjuo de redaktoro de la ĵurnalo "Diario da Tarde" kun s-ro Wilson Veado, delegito de niaj Ligoj, aperis sur ĝia numero de la 23a de Marto lasta, kiu ankaŭ aperigis ties portreton.

Okaze de kunsido de la Societo de Inĝenieroj de Minas Gerais d-ro Aristoteles Juvenal de F. Alvim faris paroladon pri Esperanto. Li daŭrigas sian kurson ĉe la "União Espírita Mineira"

kaj, plenumante peton de la oficistoj de la Departamento de Statistiko kaj Popolsumigo, malfermis alian je 19a de Marto.

**Pirapora.** — Aliĝis al BEL/IEL la klera esperantisto s-ro Inácio Matos Quinaud, ĵurnalisto, verkisto kaj redaktoro de la gazeto "A Luta".

**RIO-DE-JANEIRO.** — La prez. de BLE ricevis oficialan leteron de Kanoniko Arias Cruz, sekretario de D-ro Paulo Ramos, regdelegito en Stato Maranhão, per kiu li, en ties nomo, dankas la ekzemplerojn de la numero de "O Brasil Esperantista", kiu aperigis artikolon pri la tre valora frukto "Babauo" (Orbignia Speciosa) titolitan *Brazila Industrio*.

Sub la aŭspicioj de Brazila Klubo Esperanto, malfermiĝis en ĝia sidejo nova kurso, kiu funkcias marde kaj ĵaŭde, de la 17a ĝis 18a. Direktas la kurso s-ro ing. A. Couto Fernandes, honora prez. de tiu klubo. Per la stacio de "Rádio Nacional" s-ro Oswaldo Magalhães faris propagadon de la kurso.

S-ro Ismael Gomes Braga estas nomita Direktoro de la Propagando de Esperanto ĉe la Brazila Spiritista Federacio. Tio estas la rezultato de lia efika propagando ĉe la spiritista medio. Nur en la jaro 1939 la revuo "Reformador", oficiala organo de tiu Federacio, publikigis 33 propagandajn artikolojn pri Esperanto.

Vizitis la sidejon de BLE nia kara itala samideano Pastro A. Stellacci, kapelano ĉe la vaporsipo "Conte Grande". Pli ol unu fojon ĝin vizitis d-ro Geraldo de Azevedo kaj Osvaldo Leite de Moraes, respektive, prezidanto kaj ĝenerala sekretario de S. Paulo Esperanta Klubo, kiuj longe interparoladis kun la prez. de BLE pri la nuna vigla propagando en Stato S. Paulo. S-ro Vitor Miniero kaj fino Iracema Oliveira e Silva, geanoj de tiu Klubo ankaŭ faris vizitojn al la sidejo de BLE dum ilia restado en Rio-de-Janeiro. Akompanata de sia avo, d-ro João Thomé de Saboya e Silva, eksprezidanto de Stato Ceará, ankaŭ ĝin vizitis fino Angelita de Saboya Campos, animo de "Katolika Esperantistina Klubo", el *Fortaleza, Stato Ceará*, kiu ĵus finis sian kurson ĉe ties Normala Lernejo.

Je la 11a de Aprilo, ĉe la sidejo de "Gremio Espírita Nazareno", kun permeso de ties estraro, fondiĝis "Grupo Esperantista Bezerra de Menezes", kiu konsistas el la jenaj personoj: D-ro J. C. Moreira Guimarães — direktoro, prez. de "Centro E. Jesus-Maria-José" — unua sek., prez. de "Centro E. Jeanne D'Arc" — dua sek., prez. de "Centro E. Amaral Ornelas" — biblio-

tekisto kaj s-ro Octaviano da Silva Lopes — prokuristo. Estas elektita konsilanto s-ro Ismael Gomes Braga. Al tiu nova grupo ni deziras longan vivon.

Aliĝis al BLE/IEL s-roj Octaviano da Silva Lopes kaj ing. Antonio Damasceno Ribeiro, anoj de Brazila Klubo Esperanto.

Notoj pri Esperanto aperis en la ĵurnaloj "Jornal do Comércio", "Correio da Manhã", "Diário de Notícias", "O Globo" kaj aliaj. "Jornal do Brasil" aperigis artikolon de d-ro Domingos Barbosa, kiun ni transskribas en la nuna numero. "Gazeta de Notícias" publikigis du fotografajojn pri la Eŭropa milita, senditajn de "Esperanto Press". "Revista Espírita do Brasil" publikigis artikolon titolitan "La plivastigo de Esperanto estas venkinta idealo". "La Misio de Esperanto" — mediumeca komunikaĵo de la Spirito Emmanuel — aperis en "Reformador", "Aurora", "Mundo Espírita" kaj aliaj spiritismaj gazetoj. Interesa artikolo pri Esperanto aperis en "Globo Juvenil".

## 28.º CONGRESSO ESPERANTISTA JAPONÊS

A Liga Esperantista Brasileira riceben da Comissão Organizadora do 28.º Congresso Esperantista Japonês, que se realizará, de 28 a 30 do mês de Abril, na cidade de Miyazakin, na província de Hyuga, uma circular acompanhada do programa desse certame, que festejará o 2600º aniversário da era japonesa.

A sessão solene da abertura do Congresso terá lugar no dia 29, data do aniversário natalício do Imperador, em Miyazakiken Kyoiku Kalkan, durante a qual saudação o Congresso os representantes dos grupos japoneses e esperantistas estrangeiros. Nessa sessão será lida uma saudação da Liga Esperantista Brasileira, em nome dos esperantistas brasileiros.

Haverá também assembléia geral do Instituto Esperantista Japonês, almoço em comum e diversões.

No dia 30 os congressistas visitarão os lugares sagrados, museus, etc.

A província de Hyuga é o torrão natal dos antepassados da nação japonesa.

## B. L. E. KAJ "LA PRAKTIKO"

El letero de S-ro Andreo Cseh, direktoro de "Internacia Cseh-Instituto", ricevita de la prez. de B. L. E.: "...Kun multa plezuro ni legis kaj en la Praktiko publikigis la ĝojigajn novaĵojn pri la sukcesoj de nia lingvo en Brazilo. Via agado estas vere modela kaj alte respektinda. Precipe en la nunaj tempoj estas tre utile, ke la esperantistaro en Eŭropo povas vidi, ke nia movado vigle progresas en aliaj landoj. Ni sendas al vi kaj al viaj kunlaborantoj niajn plej korajn gratulojn kaj dankojn pro ĉi tiuj ĝojigaj kaj kuraĝigaj sukcesoj."



## ESPERANTO-MOVADO EN BRAZILU

Hodiaŭ ni havas apartan devon de danko: Heroldo akiris sian *Patronon* po 1940, kaj estas aparte signife en la nunaj cirkonstancoj ke tiu subteno venas el Ameriko, nome de Brazilia Ligo Esperantista, kiu en la lastaj jaroj tiel bonege laboris por nia idealo kaj atingis tiel atentindajn rezultojn, eĉ oficialajn. Al Brazilia Ligo Esperantista pro ĝia subteno nian plej koran dankon!

(El "Heroldo de Esperanto")

## BIBLIOGRAFIO

Ni ricevis kaj tre dankas:

INTERNACIA FOIRO DE LĤON, okazinta de 13 ĝis 21 Aprilo 1940. Belega afiŝo kaj sorbpaperoj kun teksto en Esperanto. Kiel kutime, esperantista stando estis aranĝita kaj Esperanto-Tago organizita dum la foiro.

A MISSAO DO ESPERANTO (La Misio de Esperanto) de Emmanuel e Livros em e sobre Esperanto. Ĝi enhavas la mediuemcan komunikajon de la Spirito Emmanuel, ricevitajn per la mediumo Francisco Candido Xavier, en la ordinara kunsido de la Spiritista Grupo "Luiz Gonzaga", en Pedro Leopoldo, Minas Gerais, Brazilo, en la 19a de Januaro 1940a, informojn pri Esperanto kaj katalogon de libroj vendataj ĉe la: Livraria da Federaçao, Avenida Passos, 30 -- Rio-de-Janeiro, kiu ĝin eldonis.

RADIOFONIAJ PROGRAMOJ POR EKSTERLANDO. Ĉiumonata broŝuro enhavanta la programon de la Esperanto-dissendoj de Itala Radio. Estas tre laŭdinde, ke de Januaro lasta tiu broŝuro uzas la supersignitajn literojn. Se vi deziras ĝin ricevi ĉiumonate bonvolu skribi al: E. I. A. R., Via Montelo n. 5. Roma. Italia.

AURA, 4a numero, gazeto pri Filozofio, Scienco, Literaturo kaj Arto, redaktita en portugala lingvo kaj Esperanto. Ĝia responda direktoro estas s-ro Antonio M. Espanha, prez. de Societo Esperantista "Konkordo". Senpage ricevebla. Adreso: Rua Marquês do Paraná, 403 -- XIII. Niterói. Estado do Rio.

KONGRESPREDIKO okaze de la 31a Kongreso de Esperanto de Pastro Schmid. St. Moritz, Svisujo. Okpaĝa broŝureto eldonita de la Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), kiu eldonas monatan revuon titolitan "DIA REGNO".

LA ESENCAJ TRAJTOJ DE LA KVAKERISMO. Informa letero al iu, kiu interesigas pri la "Society of Friends". Eldonita de la Friends Service Council Friends House, Euston Road, London, N. W. I.



Bloko kun 10 pecoj de la poŝtmarko memoriga de la Internacia Filatelie Ekspozicio "BRAPEX", okazinta en Rio-de-Janeiro en 1938

Prezo: Unu dolaro aŭ 15 respondkuponoj.

Mendu ĝin al: Brazilia Ligo Esperantista. Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro. — Brasil —

## NOVAĴOJ EL ITALUJO

LA NOVA FERVOJA STACIDOMO DE ROMO — Rapide progresas la grandaj laboroj por la nova stacidomo Termini de Romo, kiu konsistos el sep etaĝoj, el kiuj kvar supre de la trakarejo kaj tri subtere. La trakarejo konsistos el 22 trakoj, nome 11 paroj kun dekdu trotuaroj, kovritaj per markezoj.

Granda preĝejo estos konstruita en la unua subtera etaĝo por la haltantaj vojaĝantoj kaj por tiuj, kiuj devante forveturi frumatene dum la festotagoj, deziras plenumi siajn religiajn devojn.

AMERIKAJ KROZADOJ AL ITALUJO OKAZE DE LA EKSPOZICIO 1942.<sup>a</sup> — Starigis en New York la "Rome 1942 Exposition Tours", kiu celas organizi grupajn vojaĝojn al la Universala Ekspozicio, kiu havos lokon en Romo en 1942-a. Tiuj vojaĝoj estos pretigataj laŭ kriterioj de komforto kaj de ekonomio, daŭros 30 tagojn sed povos esti plilongigataj. La precipa specialaĵo de tiu vojaĝorganizo estas la semajna partopago de la prezo de la loga krozado, ekde la momento de la aliĝado. La Ekspozicio malfermiĝos la 21-an de aprilo 1942-a, do la vizitantoj disponas tri jarojn por pagi la tutan koston de la vojaĝo. En la prezo estas inkluzivitaj ĉiuj ekspozoj, transportoj, manĝaĵoj, loĝado, ekskursoj, ktp. Du prezoj estas fiksitaj por tiuj krozaĵoj, unu de 250 dolaroj, la alia de 325 dolaroj. Tiu iniciato estas favore akceptita kaj oni antaŭvidas plenan sukceson.

## Grupoj Aligintaj al B. L. E.

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO". (1906). Sidejo: Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro.

SUDBRAZILA ESPERANTISTIGILO. (1927). Sidejo: Rua dos Andradas, 1431. Porto Alegre. Rio Grande do Sul.

CENTRO ESPERANTISTA DE SANTOS. (1932). Sidejo: Rua Baía, 57. Santos. Est. São Paulo.

GRUPO ESPERANTISTA DE MONTE APRAZIVEL. (1935). Sidejo: Monte Aprazivel. Est. S. Paulo.

ESPERANTA GRUPO DE BAÍA. (1936). Sidejo: Rua Bangala, 18. Salvador. Baía.

S. PAŬLO ESPERANTA KLUBO. (1937). Sidejo: Rua B. Vista, 15-4.º and. sala 11/12. São Paulo.

PERNAMBUKA ESPERANTO-ASOCIATIO. (1937). Sidejo: Rua do Principe, 398. Recife. Pernambuco.

ESPERANTO - KLUBO DE SANTO AMARO. (1937). Sidejo: Av. Viana Bandeira, 10. Santo Amaro. Baía.

GRUPO ESPERANTISTA "ISMAEL GOMES BRAGA". (1938). Sidejo: Praça D. Moura, 334. Garanhuns, Pernambuco.

SOCIETO ESPERANTISTA "KONKORDO" (1939). Sidejo: Praça 11 de Junho, 49. Rio-de-Janeiro.

GRUPO ESPERANTISTA DE ARAGUARÍ. (1939). Adreso: Caixa postal 73. Aragaruí. Minas Gerais.

KATOLIKA ESPERANTISTINA KLUBO. (1939). Sidejo: Rua Benfica, 2457. Fortaleza. Ceará.

## Dicionário Completo Esperanto-Português

DE

JOSEFO JOELS

com prefácio de Ismael Braga  
Um volume com 280 páginas

Preço:

brochura . . . . . 5\$000

encadernado . . . . . 7\$000

Livraria Editora da Federação

Av. Passos, 30 — Rio-de-Janeiro

## ANONCOJ

Paĝo . . . . .	100\$000	5 dolaroj
Paĝduono . . . . .	60\$000	3 "
Paĝkvarono . . . . .	40\$000	2 "
Paĝokono . . . . .	30\$000	1 dolaro

Anonceto (du linioj) — 3 poŝtajn respondkuponojn.

"O Brasil Esperantista" petas al la estraroj de 1' brazilaj kluboj kaj al la brazilaj delegitoj de I. E. L., ke ili sendu monatan raporton pri siaj propagandaj kaj instruaj laboroj.